







№ 02
1971

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti

ferroviista



MARIBOR (Jugoslavio)

15-a - 21-a majo 1971

Post Rimini, Maribor: tiu ĉi la urbo de la 23-a I.F.E.F.- Kongreso. La plej parte de la 49 italaj gepartoprenantoj renkontiĝis ĉe Venezio kie trovis, je dispono, rezervitan vagonon. Do de la komenco la vojaĝo montriĝis tre interesa: ebleco paroli kune en nia komuna lingvo kaj oni komencis sin prepari al la Kongreso.

Trairante la Jugoslaviajn staciojn ni jam ricevis la unuajn bonvenajn vortojn per laŭtparolilo kaj esperantaj flagoj. Jam vendrede Maribor estis plen plena de eksterlandaj delegacioj. La interkona vespero en la bela salono de la restoracio Center, malfermis la aranĝojn de la Kongreso.

Dimanĉe la 16-an de majo okazis, en la salonego "Urania" la solena malfermo de la Kongreso al kiu partoprenis 718 kongresanoj el 18 landoj. La kongreson salutis interalie la membroj de la Honora Kongresa Komitato: Mirko ŽIENDER, urbestro de Maribor, Jože JAGER, Prezidanto de Centra Komitato de Sindikato de Trafiklaboristoj, Slanko BOHANEK, Ministro por kulturo kaj klerigo de S.R.Slovenio, kiu salutis en la nomo de la Registaro de Slovenio; li diris ke feliĉe li povas kontaktiĝi rekte kun la Esperanto-Movado; S-ro Georges GILLES, reprezentanto de F.I.S.A.I.C. kaj aliaj eminentuloj inter kiuj S-ro CECI, Prezidanto de D.L.F. (Dopolavoro Ferroviano) en Bologna, kiu transdonis al la L.K.K. la bronzan reproduktadon de "Neptuno" krom la salutojn kaj bondezirojn de la Ĝenerala Direktoro de Italaj Ŝtataj Fervojoj (F.S.), Ing-ro FIENGA, kaj de la Ĉefo de Centra Oficejo de D.L.F., D-ro SCODELLARI.

Ĉe la prezida tablo reprezentis la Esperantan Movadon, krom la kolegoj de L.K.K., Prof-ro D-ro Boža POPOVIĆ, Prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kaj S-ino Emilija LAPENNA, Ĉefdelegitino de U.E.A. por Jugoslavio. Ili ambaŭ salutis kaj bondeziris varme al la Kongreso. Sekvis la salutoj de la reprezentantoj de 18 landaj Asocioj. Post tio la urbestro raportis ke laŭ decido de la komunuma estraro, la placo apud la kongresejo ricevos la nomon de elstara Maribor-a Samideano Prof-ro Rudolf RAKUŠA. La paroladojn de la neesperantistaj aŭtoritatoj, tradukis majstro, D-ro Svobodan ZLATNAR. Finigis la manifestacion malferma parolado de nia Prezidanto Joachim GIESSNER.

La kulturaj artaranĝoj vekis grandegan intereson de la kongresanoj. Precipe la Arta Vespero, en kiu rolis pli ol 100 personoj, estis unuaranga travivaĵo. La plej elstara kvalito de programo de la kultura societo "Tine Rožanc" estis la varieco de dancoj, kostumoj kaj kantoj ol preskaŭ tuta Jugoslavio kaj la juneca vervo de la dancantoj.

Ĉarmega estis la orkestro de junaj harmonikistoj sub gvido de direktisto MATJAŠIĆ. Dum longa paŭzo la reprezentanto de F.I.S.A.I.C. S-ro GILLES (Belgio) transdonis arĝentajn medalojn de tiu organizo al tri elstaraj vortaristoj kiuj plej multe kontribuis al kreo de fervojista terminaro: André BLONDEAUX (Francio), Gernot RITTERSPACH (Germanio) kaj Josip ZUPANIĆ (Jugoslavio). Pri tiu mirinda manifestacio raportis la Jugoslavia televido kaj la gazetaro.

La urbestro de Maribor regalis al la estraro kaj komitato de IFEF per luksa tagmanĝo sur monto Pohorje en la domo de la fervojistoj.

Lundon, matene kaj posttagmeze, la komitato de IFEF pridiskutis diversajn problemojn kaj projekton de sanĝo de statuto de la Federacio. Krome oni reelektis Kurt GREUTERT (Svislando) kiel ĉefkomitatano por la sekvontaj du jaroj kaj F-ino Greta GOSSL (Austrio) kiel kromkomitatano pri junularo, kaj elektis Lorenzo MANTOVAN el Venezio kiel junulara kromkomitatano.

Al Pohorje posttagmeze ekskursis la plej parte de la kongresanoj. Internacia balo aparte altira, precipe por gejunuloj, finiĝis en frumatonaĵ mardaj horoj, kiam la prezidanto kaj la sekretario de L.K.K. A. PRATNEMER kaj L. PREBIL zorgis ke la lastaj bonhumoraj gastoj, loĝantaj ekster la urbocentro, atingu sian hejmon per la aŭtomobilo de la prezidanto.

Mardon estis streĉa tago pro gravaj kunsidoj de komisionoj (fakprelega, terminara, statuta, kaj junulara sekcio). Posttagmeze la dua mirinda ekskurso al antikva urbo Ptuj, per aparta speciala trajno, estis vere kiel rekompenco por bone plenumita laboro. La kongresanojn en Ptuj bonvenigis la fervojista blovorkestro, la tica Esperanto-pio-

niro Josip DOMAJNKO kaj la Prezidanto de socialista unuiĝo K-do Tunšek, kiu alparolis la gastojn kaj regalas per aperitivo. La 1900 jar-aĝa urbo estas plona da vidindaĵoj, sed la kongresanoj vizitis nur la malnovan kastelon kaj la apudan restoracion.

Merkredon estis denove sub la signo de streĉa labora atmosfero. Fakprelego de Inĝ. Ludoviko SEKERESĤ pro "Modernigo de Jugoslaviaj Fervojoj" antaŭ plenplena salonego; publika diskuto pri Jugoslava momadministrado, kiun, surbaze de la artikolo presita en la Kongresa libro, enkondukis Gvozden SREDIĈ, vekis grandan intereson; 30 diverslandaj kongresanoj starigis demandojn al kiuj lerte respondis kologo Srediĉ. Post la prelego 60 diverslandaj fakuloj vizitis fabrikan de fervojaj veturiloj "Boris Kidriĉ". Sekvis interparolado de IFEF-Junularo, T.E.J.O., kaj loka Esperanto-Junularo kiuj interŝanĝis spertojn kaj priparolis interŝanĝojn.

Prelego pri klerigado kaj moderniga instruo de Esperanto, kiun faris Antoni SEKELLI (Jugoslavio) kaj Fritz LAUTENBACH (Germanio) estis bonege vizitita. Junularan kultur-amuzan vesperon en la Domo de Jugoslavia armeo, partoprenis tiom da kongresanoj ke ankaŭ apudaj salonoj estis plen plonaj.

Ĝaŭde dum la plenkunsido oni pridiskutis la estontan kongreslokon kaj decidis ke la sekvonta, la 24-a IFEF-Kongreso okazu en LUGANO (Svislando), inter la 6-a kaj 12-a de majo 1972-a kaj por 1973-a oni antaŭ vidas Jubilean Kongreson en Dana urbo Aarhus.

La Teatra Vespero finigis la kongreson per mirinda prezontado de la triakta komika Opero "Gorenjski slaĉek" (Najtingalo el Gorenjsko) de Anton Foerster, en la luksa Slovena Nacia Teatro.

Post la Kongreso la plimulto de la kongresanoj faris tuttagan ekskurson al famkonata groto de Postojna, kie okazis la fermo de la kongreso fare de Prezidanto GLESSNER, kaj veturis al Mdveja apud konata marborda banejo Opatija, por dutaga postkongreso.

Grandan intereson vekis la nova horarlibro de Jugoslaviaj fervojoj (kun Esperanto-toksto) kiu aperis dum la kongreso (merkredon) ĉe la librostando, same kiel la fervoja terminareto en amplekso de 3000 terminoj, kiun pretigis Inĝ. Ludoviko SEKERESĤ el Novi Sad kaj Josip ZUPANIĈ el Zagreb.

La televido kaj gazetaro dediĉis sian atenton al tiu ĉi Kongreso de Fervojistoj Esperantistoj; taggazeto "VEĈER" havis apartan kolonon Esperantlingve skribitan.

La fervojista gazeto "ŽELEZNIĈKE NOVINE" abunde raportis pri la kongreso, presis artikolojn kun multaj fotoj kaj dulingvan (nacia kaj Esperantan) frontartikolon "BONVENON!"

Apartajn dankojn ni ŝuldas al Jugoslavaj Fervojoj kiuj rajtigis nin uzi la Kongresan Karton kiel senpaga bileto por la 1-a klaso de ĉiuj trajnoj sur ĉiuj linioj de Jugoslavaj fervojoj dum la tuta monato majo. Multaj gekolegoj ekskursis tra Jugoslavio dum la tuta somajno post la Kongreso. G.G.

===== 56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO =====

LONDONO, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1971-a.

ALTA PROTEKTANTO: Urbestro de Londono Sir. Peter S T U D D.

Konstanta Adreso: Nicuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

Koncerthalo luita: La inaŭguro de la 56-a U.K. okazos en la impona KONCERTHALO ROYAL FESTIVAL HALL (reĝa Festivala Halo) ĉe la bordo de Tamizo. Konstruita en 1951-a por Festivalo de Britujo, la Koncerthalo fariĝis grava muzika centro en Londono pro sia arkitekturo kaj bonega akustiko. EN la sama loko estos prezentata ankaŭ la Brita Vespero, dimanĉon la 1-an de aŭgusto.

Fervoja rabato: Unuafoje nacia fervojdirekto presigis kaj mem financis la fervojrabitilojn en Esperanto.

Gvidfolioj pri Londono: La Brita Turisma Instanco provizos ĉiun kongresanon per turisma flugfolio kun mapo de Londono. Alia oldonaĵo, krom la jam anoncita "JEN LONDONO", estas reklama kaj informa folio de Londona Transport-Instanco.

Bonvenon: Por fruaj alvenontoj la Londona Esperanto-Klubo aranĝos bonvenigan vesperon vendredo, la 30-an de julio. La kluba kunveno (adreso: 153 Drummond Street) situas nur kelkajn minutojn for de la kongresejo.

Ĝisdata statistiko: Al la 56-a U.K. aliĝis ĝis la 5-a de majo 1971-a, entute 1635 kongresanoj el 38 landoj.

Karaĵ gosamidoanoj "ĜIS LA REVIDO EN LONDONO!"

ESPERANTO EKFLORAS EN ROMAGNA - REGIONO

La 30-an de majo 1971-a la nove fondita Esperanto-Grupo de Cesena prezentis sin al la esperanta kaj ekstera publiko per trafa Esperanta manifestacio. La tago, oportune elektita, estis Pentekosto; ĝi komenciĝis per Sankta Meso en Esperanto en la preĝejo de Sankta Maria de la Espero (Nia Sinjorino de la Espero estas Protektantino de la Esperantistoj). Celebris Pastro Bruno BENINI, kiu kvankam novbakita esperantisto, bone kaj trafe substrekis dum la Omilio, la valoron de Esperanto.

Poste sub lerta gvidado ni vizitis la mirindan "Biblioteca Malatestiana" artan juvelon de Cesena kaj de la tuta Regiono. Komuna tagmanĝo sekvis; kaj vizito al la aliaj artaj kaj naturaj vidindaĵoj kiujn oni povas admiri en la urbo Cesena, jam citita de poeto Dante en sia ĉefverko (La Dia Komedio).

Tiun ĉi belan tagon ni ŝuldas al Prof-ro Romeo PAGLIERANI kaj al la lokaj Esperantistoj: Ermanno BISSI, Paolino MAZZINI, Teresa GIROTTI kaj Rita DE GIOVANNI.

INAŬGURO DE "LARGO L.L.ZAMENHOF" EN RAVENNA

Dimanĉon la 6-an de junio 1971-a, okaze de la inaŭguro de Zamenhof-strato, disvolviĝis en Ravenna, interesa Esperanto-manifestacio, al kiu partoprenis pli ol 130 personoj, italaj kaj eksterlandaj. La urba konsilantaro jam pasintjare, okazo de la 22-a I. F. E. F.- Kongreso, decidis titoligi al D-ro Zamenhof, straton en nova homplena kvartalo.

La strato kun la tabuloj kun skribaĵo "Largo L.L.Zamenhof-kreinto de Esperanto", jam ekzistis, sed la 6-an de junio oni oficiale inaŭguris ĝin.

Je la 10-a horo, D-ro STOPPOLONI, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, kun la ĉeesto de skabeno de la komunumo D-ro LA TORRE, per mallonga parolado inaŭguris la straton kaj la Esperantan ekspozicion apude aranĝita de la lerta Ravenna Esperanto-Grupo.

Poste, en la kvartala preĝejo, okazis Esperanta Diservo fare de Pastro CICCANTI.

Tagmeze, en la luksa salono de la urbdomo, la reprezentanto de la Urbestro salutis la geesperantistojn per allogaj vortoj, memorigante ke ankaŭ pasintjare la urbo gastigis multnombrajn fervojistojn esperantistojn.

Dum kaj post la komuna tagmanĝo la membroj de L.K.K. (Interregiona Konsulta Komitato) laboris longe, sub prezido de D-ro Stoppoloni, dum aliaj, vizitis la mirindajn monumentojn de la urbo. La ĉeesto de diversaj eksterlandaj Esperantistaj geedzoj kiuj partoprenis la konkurson "MILAN LUNON EN RIMINI", akompanataj de la Redaktorino de "Heroldo de E.", s-ino Ada FIGHIERA-SIKORSKA, vekis simpatian.

Pri tiu bela tago ni ŝuldas dankon al senlacaĵ Pastro DURANTI kaj Rag. BAGNOLI.

AKTIVAĴOJ DE NIAJ GRUPOJ:

La fervojista esperanto-grupo de Porretta Terme organizis novajn Esperanto-kursojn, unuagradan kaj duagradan. Plue kelkaj lokaj esperantistoj preparas sin subteni la triagradan ekzamenon. La kursoj okazas ĉe la komunuma biblioteko, ĝentile disponigita de la Urbestro kaj de la urbaj aŭtoritatoj.

NOVA MALGRANDA GRAMATIKO DE ESPERANTO:

Juna novbakita Esperantisto: S-ro Giuseppe GALZERANO, Verkisto, kiu kunlaboras al diversaj gazetoj, publikigis 12-paĝan gramatikon de Esperanto titolitan "V'INSEGNO L'ESPERANTO". La gramatiko kostas 150 lirojn. Mendu ĉe la aŭtoro (G. Galzerano, I-84040 CASALVELLINO SCALO "SA"): 10 kopioj £.1300; 20 £.2500; 50 £.6000; 100 £.11500. Aliaj rabatoj por pligrandaj kvantoj.

NEKROLOGOJ

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS:

Aliaj karaj amikoj kaj kunlaborantoj en la Fervojista Esperanto-Movado forlasis nin por ĉiam:

--- La 12-an de februaro 1971-a, martis en Verona kolego Cesare CERONI BASSANI, dum longa tempo sekretario de Itala Fervojista Esperanto-Asocio "I.F.E.A." kaj neforgesebla organizanto de la 6-a IFEF-Kongreso en Verona dum la jaro 1954-a.

Li estis inter ni lastfoje okaze de la 22-a IFEF-Kongreso en Rimini kie li salutis siajn multnombrajn eksterlandajn amikojn kaj kolegojn.

--- La 7-an de marto subite mortis en Romo, pro infarkto en la aĝo de 70-jaroj, Samideano Ascenzio BLASIMME, eks funkciulo de Italaj Ŝtataj Fervojoj, esperantisto ekde la

jaro 1926-a, de longe membro kaj estrarano de nia Asocio; dum pli ol 20 jaroj li estris la Esperanto-Fako de Radio Roma.

-- La 1-an de aprilo, sekve de subita abrupta malsano mortis nia ano Carlo MAGOGA el Castolfranco Veneto (Treviso), membro de la fervojista Esperanto-Grupo "LA GONDOLO" en Venecio.

-- La lastan 4-an de junio subite mortis en Bologna en la aĝo de 65-jaroj nia kara: D-ro Ing. Giorgio ORSI, eks grava funkciulo de Italaj Ŝtataj Fervojoj, de longe fide-la membro de nia Asocio kaj simpatia partoprenanto de niaj kongresoj.

Ke ili ripozu en paco!

Al la trafitaj familianoj la sincerajn kondolencojn de la tutmonda kolegaro!

MALPROKSIMA ESPERANTO-AMIKO FORLISIS NIN POR ĈIAM
=====

La 15-an de aprilo 1971-a, mortis en Varna (Bulgario) en la aĝo de 68-jaroj, nia granda amiko: Aleksandro F I L I P O V P E N K O V.

Li estis vere entuziasma esperantisto. Ni memoras lian helpemon al ni okazo de la 20-a Jubilea IPEF-Kongreso en Varna dum majo 1968-a. Lia granda kaj helpopreta figuro kiu atendis nin en la stacidomo de Varna, por akompani al la loĝejoj kaj sin metis je nia dispono por helpi nin dum la tuta somajno, ĉiam restos en la koro de ĉiuj Italaj gepartoprenantoj al la Varna Kongreso.

Al la odzino Mara, al la filino kaj al la Bulgaraj geamikoj, ni sendas kondolencojn kiuj venas de la profundo de la koro. Ke la Eternulo akceptu lin en la aro de la Beatoj.

N I L E G I S
=====

NOTIZIARIO DEL GRUPPO ESPERANTISTA TRENINO: Bela, eĉ luksa la itallingva 1-a numero de "Notiziario del Gruppo Esperantista Trentino", kiu celas atingi, en la regiono, tiujn, kiuj sentas la problemon pri internacia lingvo. Post ĉapitro kiu konigas la celojn de la Grupo, kaj kiamaniere agi por sukcesi, ĝi entenas interesan longan artikolon kiu raportas la ĉefajn partojn de la parolado de Prof. Ivo Lapenna je inaŭguro de la Universala Esperanto-Kongreso en Haarlem (Nederlando). Mallongaj sciigoj pri la nunjaraj Esperanto-Kongresoj, kaj la listo de aliaj eldonaĵoj de la Grupo kompletigas la numeron. "Notiziario" kiu aperos je ne fiksa dato, estos senpage sendita al tiuj, kiuj ĝin mendos ĉe "GRUPPO ESPERANTISTA TRENINO, Via Cavour, 17 - I-38100 TRENTO.

KLEREKO POR HODIAŬ KAJ MORGAŬ: estas tre interesa broŝuro kiu debatas la problemojn de klerigado por altnivela estonto. Ĉar en Germana Demokrata Respubliko oni atingis tutmondan estimon kaj reputacion tiurilate, la libreto entenas saĝajn konsilojn kaj publikigas la spertojn de instruistoj kaj studentoj de diversaj lernejoj. (801)

2-a aktualigata eldono. Eldonejo Zeit im Bild - Julian-Grimau-Allee, D.D.R. DRESDEN

NOVAJ TURISTAJ ESPERANTAJ PROSPEKTOJ
=====

"LUGANO - Suda Svislando" - Por reklami la urbon de la 24-a IPEF-Kongreso la lokaj aŭtoritatoj de urbo Lugano, eldonis buntan kvarpaĝan faldfolion kun mapo de la regiono de la lago "ĜERESIO". La multaj belegaj kolor-fotoj kaj la esperantoteksto kiu laŭdegas la situon, la klimaton, la floraron, la arton, la distraĵojn, la sportojn, kaj la aranĝojn de Lugano kaj ĝia Lago, allogos la venontjarajn vizitantojn.

Do partoprenu multnombraj al nia 24-jara renkontiĝo.

"BONVENON AL GOTENBURGO": Eldonita de Turist-Trafika Asocio de Okcidenta Marbordo, okazo de la 350 jaroj post la fondiĝo de la urbo Gotenburgo. Ampleksa faldfolio kun belegaj koloraj fotoj, detalaj mapoj pri la urbo kaj regiono.

Se vi deziras pliajn informojn okazo de vizito al Gotenburgo, bonvolu skribi aŭ alinaniere kontakti kun: TURISTA OFICEJO, Parkgatan 2, S-411 38 GOTENBURGO (Svedio), kiu volonte poros al vi kontakton kun la urba UEA-delegito por turismo.

E S P E R A N T O E N L A R A D I O
=====

RADIO ROMA - ESPERANTO-FAKO: Casella Postale 320 I-00100 ROMA (Italujo). Dissendoj en Esperanto, jaro 1971-a. La dissendoj okazas de h.21 ĝis h.21,20 de ĉiuj dimanĉoj (M. E.T.) Ondlongoj: metroj 30,90; 41,24; 50,08. Ĉiujn dissendojn enhavas "Kuriero de E." Redakcio: Renato CORSETTI, Antonio DE SALVO, Vera DE TOCCO. Privata adreso de la redaktoro: Antonio DE SALVO, Via Oibia 15, I-00182 ROMA (Italujo).